# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 23/05/2024 sescentokdekoka eldono (unua eldono 26/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Esperanta Retradio

Donas bonan Ĉirkau -5 minutan aŬskultadon kaj legadon Ĉiun tagon Ne estas facila elekti el la ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.

NECESAS DISVOLVI NOVAJN ANTIBIOTIKAĴOJN 20A DE MAJO 2024 (*ROGER SPRINGER*)

## Kun amika saluto, Katja Steele. Printempa ondo

Aperis la demonstra versio de la marta (printempa) eldono de la trimonata bitgazeto *La Ondo de Esperanto*. La 41-paĝa demoversio (pdf) enhavas plurajn tekstojn kaj tekstokomencojn el la riĉenhava kaj ampleksa 132-paĝa 319-a eldono de *La Ondo*, dissendita al la abonantoj antaŭ kvin semajnoj. Legu la demoversion kaj decidu pri (re)abono por 2024: https://sezonoj.ru/2024/05/ondo-127/

## Sociaj retejoj en la fokuso

Jen ligilo pri la evento *sociaj retejoj* kaj eventaservo.org kun Debora Rossetti, Yves Nevelsteen kaj Laura Brazzabeni. https://youtu.be/Ur4sO_Q5fIA?si=E-Yi3nxuVNSHIqvY

## Pionira poetino en la memoroj

Antaŭ cent jaroj, la 7-an de majo 1924, naskiĝis Marjorie Boulton, angla instruistino kaj Esperanto-poetino. Okaze de ŝia jubileo *La Ondo de Esperanto* proponas (re)legi kelkajn ŝiajn poemojn, kiuj aperis en *Baza Literatura Krestomatio:* https://sezonoj.ru/2024/05/boulton-3/

**3ZZZ** Parto de la elsendo de la 20a de majo 2024 estas dediĉita al Eŭropo (Eŭrovizio , politika partio ligita al Esperanto por la venonta balotado, la 25a jariĝo de la eŭro ) sekvas opinio pri la nuna sinteno rilate Klasbatalon kaj okaze de la 215a naskiĝtago de Charles Darwin Frank van Hertrooij demandas sin ĉu oni devas konsideri lin kiel heroon

Bonvolu ne forgesi la jarkunvenon de la grupo Esperanto la 3an de junio je la 2.30 ptm en la radiostacio



*Franciska Toubale*


# La 22a de majo estas mia 93a naskiĝtagfesto *Roger Springer*

## El Melburno

" Novaĵo de la Melburna Esperanto klubo. Pasintan lundon ni bonvenigis tri novajn membrojn kaj ĝuis vesperon kun prelego de Ĉarles Stevenson pri fruaj Melburnaj Esperantistoj kaj ekzercoj preparitaj de Joanne. Ni ankaŭ celebris la naskiĝdaton de Ĉarles.

Ni daŭre serĉas nian propran kunvenejon kun kelkaj eblecoj "en la vento".

Ni gratulas Roger Springer kiu atingis sian 93an jaron kaj esperas ke li longe daŭrigos la bonegajn eldonojn de Austaliaj Esperantistoj.



*Heather Heldzingen*

Kara Roger, 2024-05-22
Jes! LA tago por serioze pensi pri vi, cerbumi pri la senĉesa fluo de la tempo kaj por deziri al vi

==========================================

**FELIĈAN DATREVENON DE VIA NASKIĜTAGO**

==========================================

Ne hezitu kaj festu serioze.......... Kaj vivi aliajn 16 jarion por produkti aliajn 212 eldonojn de "AE"
Plej amike, *Sandor Horvath*

"Feliĉan naskiĝtagon al Roger . Mi esperas ke vi ankoraŭ longe havos la forton por daŭrigi vian valoran laboron kaj ĝui la vivon . Franciska"
Amike, *Franciska Toubale*




Almenaŭ Esperantistoj donas sian tempon al la solvo de grandega problemo de la homaro

*Roger Springer*